

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1993:6

*Al ĉiuj membroj
kaj legantoj:*



*Bonan Kristnaskon
kaj feliĉan novan jaron!*

Deziras SEF kaj La Espero

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Decembro 1993 • 81-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör/redaktoro:

Per Aarne Fritzon,
Västertorpsvägen 154,
129 44 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Quintus, Sollentuna 1993

Prenumeration 1994: 150 kr. Gävo-
prenumeration till utlandet: 80 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften. Postgiro
20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax: 08-34 08 01

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men
säkrast måndag och torsdag 17.30-19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1994:

Direktansluten medlem 150 kr.
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B,
Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsda-
gar kl. 17-18. Skriftliga beställningar
expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Storgatan 13, 753 31 Uppsala



DONACOJ

Skellefteå Esperantoklubb 3000, La Esperanto-klubo de Lund (memore de Walter Bjerkemo) 200. Familjen Malte Markheden, Strömsnäsbruk (till minne av vid Rune Svenssons, Ljungby, jordfästning) 100. Lennart Svensson, Annerstad (Till minne av Rune Svensson) 100. Anonima donaco (gratule al Kaisa Hansen je ŝia 50-jariĝo, kun la speciala celo de materialo por montrofenestro de la nova Esperanto-Centro) 1000. Per Aarne Fritzon k. Lena Månsson, Stokholmo (gratule al Kaisa Hansen je ŝia 50-jariĝo) 225. Norah Svensson, Ljungby (till minne av Rune Svensson) 500. Krome anonimaj donacoj aŭtogire.

KLUBO CENT

Runo Stridell, Linköping 100.

KLUBO MIL

Membroj dum 1993:

1. Sten Broman, Skövde	1000
2. Erik Svärd, Malmö	1000
3. Klubo Esperantista de Malmö	1000
4. Helsingborgs Esperantoklubb	1000
5. Sven Möllestad, Helsingborg	1000
6. Gösta Hedlund, Uppsala	1000
7. Harald Andersson, Grythyttan	1000
8. Karl Brännberg, Västerfärnebo	1000
9. Sigurd Olsson, Strömsnäsbruk	1000

Vi povas aliĝi por 1994 pagante
SEK 1000 (aŭ pli) al pĝk 20 12-3.

ANONCETOJ

Leif Nordenstorm havas novan adreson:
Landstingsvägen 9 A, 961 44 Boden.

Korespondi deziras: 39-jara sud-korea militisto, komencanto, patro de du filinoj, deziras korespondi kun sinjoro proksimume 50-jaraĝa: Choi Kyoung-deuk, P.O. Box 1 Hoe Hyeon ri, Yang Pyoung-eub, Yang Pyoung-kun, Kyoungki-do, 476-809, Sud-Koreo.

Korespondi deziras: Geedzoj loĝantaj en Aŭstralio, du malgrandaj infanoj, serĉas gekorespondantojn. Interesiĝas pri lingvoj, literaturo, budhismo, historio, psikologiaj kaj terapeŭtikaj temoj, meditado, infanoj, ekologio: Nigel Haeng Cho Barber kaj Evelin Christina Barber, 16 Murray Court, Tootgarook Victoria, Australia 3941.

Korespondi deziras: Direktoro de elementa lernejo, mem komencanto kun granda intereso pri E-movado, kiu iniciatis kurson por lernantoj en la sesa kaj sepa klasoj (12-13-jaraj geknaboj), serĉas korespondamikojn por si mem aŭ/kaj la infanoj: Mato Špekuljak, Oštariska 8, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

**Koran dankon al
ĉiuj donacintoj!
Novaj donacoj
estas bonvenaj al
SEF-poŝtgiro
20 12-3**

Per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L. L. ZAMENHOF, KOMPOSTITA PER LA LITERTIPO DIALOG]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj
en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj.
Pli ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAKSO 08-712 39 93

Verda biciklado en Aŭstralio

Ofte unu vojaĝo donas ideon al alia. Tio okazis al mi, kiam mi en januaro ĉeestis la somerkurson de esperanto en Adelaido (v. *La Esperon* 2/93). Mi tiam rimarkis, ke **Terry Manley**, esperantisto el Sidnejo, ĉiutage venis bicikle al la kolegiejo. Jen duobla samideano, mi pensis, kaj alproksimiĝis por demandi lin, ĉu ni biciklu kune. Li konsentis, kondiĉe ke la biciklado okazos vintre!

Aŭstralia vintro

Temas pri aŭstralia vintro, kiu por ni nordianoj signifas bonegan someron. Sekve ŝajnis, ke mi ekskursas al somero, kiam mi alvenis al Brisbano la 3-an de aŭgusto ĉi-jare, malgraŭ la fakto ke estis vintro. Mi tuj trafis en Esperantujon, gastante ĉe **Jay Grant** kaj tre agrable pasigis la vesperon kun ankaŭ aliaj lokaj esperantistoj.

La sekvan tagon ni forveturis aŭtobuse 3 horojn suden laŭ la marbordo al Brunswick Heads, de kie ni intencis komenci nian verdan bicikladon. Tie jam atendis nin dek-rapiduma montobiciklo, la posedaĵo de alia esperantisto, **Jim Jones**.

Finfine ĉio estis preta por ekiri. La bicikloj estis ŝarĝitaj per pezaj sakoĵoj, ĉar ni devis mem kunporti ĉion bezonatan; ni celis al la pluvarbaroj kaj montaroj sur la bordo de Nova Sud-Kimrujo kaj Kvinslando, kaj tie ne troviĝas vendejoj.

Forta virino

La unuan tagon ni alvenis al la piedo de la monto Warning (averto), kie ni dormis sub la libera ĉielo en la nigra nokto. Blovis forte, kaj mi malklare komencis rekoncideri la tutan aferon! Matene mi ekkomprenis, ke mi estis farinta alian eraron: Terry proponis, ke ni suprengrimpu la monton mem. Fakte tio ne estis propono. Mi ne povis nei, ĉar mi ja estas forta virino, kiu kapablas ĉirkaŭbicikli la lagon Vättern, 300 km dum unu tago. Estonte mi klopodos silenti pri miaj diversaj agadoj!

La vojeto al la pinto kondukis tra la pluvarbaro kun arboj pli ol 30 metrojn altaj. Ni sentis nin malgrandaj en la ombro de la imponaj arboj kaj aliaj plantoj. Birdkantado plenigis la aeron kaj sur vojeto promenis meleagroĵoj. Post pli ol unu



Anita kaj Terry pozas kun siaj montobicikloj, survoje al aventuroj en la aŭstralia naturo.

horo, ni atingis la plej malfacilan parton de la grimpadon. Antaŭ ni aperis preskaŭ vertikala roko. Kun maltimo pri la morto kaj defendante la honoron de svedaj esperantistoj, mi ekkaptis la ferĉenon, kiu feliĉe "kreskis" sur la roko. La kompenson mi ricevis sur la pinto: la panoramo de la alto je 1156 metroj estas vere mirinda. Malproksime videblis la Pacifika oceano. La monto iam avertis la ŝipestron Cook pri la danĝeraj rifoj kaj tiel ricevis sian nomon.

Post montogrimpado estis ripozo bicikli, kvankam la femuroj kaj suroj doloris. Mi suferis silente! Mian tutan atenton mi devis direkti al la gruzvojoj, sur kiu estis grandaj kaj etaj ŝtonoj, grandaj kaj etaj kavetoj, kaj kiu serpentumis sufiĉe krute supren kaj malsupren. Feliĉe ne estis multe da veturiloj, ĉar tiuj malagrabla polvigis nin.

Aliaj birdoj

Post kelkaj tagoj aliĝis al ni du amikoj de Terry, **John Martin** kaj **Helen Webb**, kaj ni fariĝis amikeca grupeto de kvar naturamaj biciklantoj. La vetero estis ĉiutage bonega, la suno brilis kaj la temperaturo estis je ĉ. 20–25 gradoj. Ni plene ĝuis la

bicikladon, ĉirkaŭite de grandegaj arboj, kiuj donis agrablan ombron. La birdkantado malsimilis al la kantado en svedaj arbaroj. Aparte la puraj tonoj de la sonorilbirdo ravis nin pli facile suprenveturi la deklivojn. Kelkfoje mi vidis malgrandan kanguruon transsalti la vojon. Grandaj lacertoj, je 50 cm longaj, ofte moviĝis en la kreskaĵoj ĉe la tendumejoj. Ni eĉ plurfoje pendigis nian manĝaĵon sur arbon, por ke la bestoj ne rompu la sakoĵojn serĉante ĝin.

Ene en la naturo

Nia biciklado ebligis al ni viziti lokojn famajn pro sia beleco. Ni estis ene en la naturo kaj dependis de niaj propraj fortoj preskaŭ en la sama grado, kiel la aliaj diversaj enloĝantoj de la verda pejzaĝo. Ni leviĝis kun la suno kaj ekkampis je la sunsubiro. Malheliĝas frue, jam je la 18-a horo. Por havi tempon kolekti eŭkaliptobranĉojn kaj alion bruligeblan por la fajro, ni strebis atingi nian celon antaŭ tiu horo. Ne ĉiam ni sukcesis. Foje ni malsupreniris krutan deklivon ne vidante ĝin, nur sentante. Feliĉe ni ne falis de niaj pezo ŝarĝitaj bicikloj! Nur mense ni falis, matene, kiam ni vidis la deklivon kaj komprenis, ke ni devos suprenpuŝi la biciklojn. Ni tamen

portempe lasis la problemon kaj eniris la arbaron por matenmanĝi ĉe belega akvofalo. Poste aperis veturilo kun afabla paro, kiu konsentis veturigi niajn sakojn ĝis la vojo. Liberigitaj de niaj pakaĵoj ni facile sekvis.

Laŭta pafado

Kutime aŭtomobilistoj gaje mansalutis nin. Ni do estis ekzotaj, survoje alte en la montaro. Ĝenerale la homoj tre bonkore traktis nin, kaj eble ankaŭ kompatis! Kial bicikli, kiam ekzistas aŭtomobiloj? Ni nur ridetis, ĉar tiuj kompatindaj ne komprenas la ĝojplenan kaj kontentigan senton antaŭiri per propra fizika movo. Ĉiutage ni plifortiĝis kaj pliamikiĝis. Ni plene ĝuis la vivon, kiam subite, alte en la montaro, ni aŭdis laŭtan pafadon! Ĉu estas ŝtelĉasistoj en la nacia parko? Mi singarde rigardis malantaŭen. John jam haltis por ekzameni sian eksplodintan pneŭmatikon! Li riparis ĝin iel-tiel, sed klare bezonis novan por daŭrigi la bicikladon. Optimisme ni lasis la problemon ĝis la sekva tago, kiam troviĝis trafikilo iranta al la proksima urbo. John forlasis nin por dedifinita tempo,

t.e. ĝis la sekva mateno, kiam li ekaperis survoje kun nova pneŭmatiko.

Plurfoje dum la biciklado ni de malproksime revidis la monton de Averta. Ŝajnis nekredible, ke ni fakte estis starintaj tiel alte! La monto estas vulkano, kiu an-



taŭ longe formis la ĉirkaŭitan valon. Tio estas bone videbla de la belvidejo Blackputt je la alto de 8000 metroj. Vespere, en la malhelo, la valo kun siaj lumoj fariĝas ia speguliĝo de la vera, surĉiela stelaro. Matene la suno malrapide suprenrampis de malantaŭ la nuboj kaj montaro. Antaŭ ni en la mezo staris la monto de Averta, kiel nigra suvereno de la valo.

Subite aperis la tuta brilanta sunĝlobo, kaj tiun tagon ni estis la unuaj homoj en Aŭstralio, kiuj vidis la sunon!

Sub la Suda Kruco

Post du semajnoj ni revenis al Brunswick Heads. Dum unu tago ni ĉirkaŭbiciklis en la urbo, ni eĉ preskaŭ flugis, ĉar ni estis fortaj kaj liberaj, sen pezaj sakoj surbicikle. Ni naĝis en la maro kaj manĝis glaciaĵon. Vespere ni iris al la riverbordo por prepari la lastan komunan vespermanĝon sur fajro. Ni sidis, kiel ni jam estis alktimiĝintaj, sub la Suda Kruco kaj kontentiĝis per bongusta manĝaĵo kaj varmiga amik-eco. Matene nin vekis birdkantado, ĉar kompreneble ni la lastan nokton dormis sub libera ĉielo.

Ni disiĝis. Mi sola revenis aŭtobuse al Brisbano, kie Jay Grant afable akceptis min. Koran dankon por tio, ĉar mi ja venis plenplena je travivaĵoj rekte el la laŭlitere verda mondo en la urbon, kaj tiel estis komforte denove trafi en la figure verdan Esperantujon.

Anita Bergh

Medlemsavgift till UEA

Nu är det tid att betala avgiften till UEA för 1994. Som direktmedlem i UEA ger du världsförbundet ett extra stöd, samtidigt som du själv får en del förmåner, t.ex. nedsatt kongressavgift för kategorierna MJ, MA och DM. UEA behöver allt vårt stöd för att kunna genomföra sin arbetsplan. Även gåvor emottages med största tacksamhet. Pengarna kan skänkas till bl.a. fonderna *Canuto* (medlemsavgifter för esperantister i u-länder), *Ameriko* (rörelsen i Latinamerika), *Biblioteko* (UEA:s bibliotek) och *Volontulo* (för ungdomspraktik vid UEA:s huvudkontor i Rotterdam) eller till UEA:s allmänna kassa.

Avgifterna för 1994:

MA	Medlem med årsbok och tidskriften <i>Esperanto</i>	400 kr
MJ	Medlem med årsbok (ungefär 400 sidor)	160 kr
MG	Medlem med <i>Gvidlibro</i>	65 kr
SZ	Societo Zamenhof, för den som vill ge UEA ett extra ekonomiskt stöd. (Medlemskap ingår ej.)	800 kr
PT	Patrono de TEJO, stöd till ungdomsförbundet TEJO, <i>Kontakto</i> och andra TEJO-trycksaker ingår. (Medlemskap ingår ej.)	480 kr
DM	Livstids medlemskap med livstids prenumeration på årsboken och <i>Esperanto</i> .	8000 kr

Den som ännu inte fyllt 30 år 1 januari 1994 och blir medlem i någon av kategorierna MJ, MA eller DM får även *Kontakto* och *TEJO-tutmonde*. Ange därför födelsedatum.

Avgiften kan betalas in på pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser. Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

Ska du åka på UK i Korea?

1994 års esperanto-världskongress äger rum 23-30 juli i Seoul, Sydkorea. Förutom allt det som själva kongressen har att bjuda, är detta ett tillfälle att besöka ett fascinerande land. Om många beställer tillsammans, kan flygbiljetten fås till förmånligare pris. Är du intresserad av att delta i en gruppresa, kontakta:

Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen, tel: 08/777 41 75.

Annonsera i UEAs årsbok!

Både esperanto-företag och andra har möjlighet att annonsera i UEA:s årsbok.

Även klubbar kan få in annons om möten, klubblokaler, kontaktperson m.m.

Ytterligare information och prisuppgifter lämnas av:

Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

Kongreso en la koro de Skanio en 1994

Höör – la koro de Skanio – estas loko de la SEF-jarkongreso de 1994.

Esperanto havas longan tradicion en Höör. Jam en la komenco de la tridekaj jaroj fondiĝis klubo tie. Inter la iniciatintoj troviĝis la fratoj Nils kaj Olle Olsson. La klubo ankoraŭ ekzistas, sed antaŭ kelkaj jaroj ŝanĝis sian nomon al Mez-Skania Esperantoklubo. Dum la 50-aj jaroj, la Sveda Somera Semajno okazis plurfoje en Frostavallen apud Höör. Tiuj aranĝoj estas fame konataj kaj donis grandan eĥon

en la esperanta mondo. SEF okazigis la renkontiĝojn, kun Jan Ströme kiel ĉefa rolanto.

Nun ni denove donos al Höör lokon en la centro de la esperanta intereso, kiam tie 27–28 majo 1994 okazos la sveda jarkongreso. La kongresejo estos la nova dioceza centro Åkersberg.

Åkersberg ne vere estas nova loko en si mem, sed kiel dioceza domo ĝi estis inaŭgurita nur ĉi-aŭtune.

Jam en 1687 la grundo estis donacita

al nobelo pro liaj kontribuoj en la milito kontraŭ Danlando. La grafo konstruis tie sinjoran bienon. Alia nobela familio aĉetis la ejon kaj plukonstruis dum la lasta parto de la 18-a jarcento. La glora periodo de Åkersberg kiel bieno pasis inter 1860 kaj 1880.

Ĉirkaŭ 1880 oni konstruis la fervojon kaj Åkersberg donacis grundon por la stacidoma areo. La vilaĝo kreskis, kaj sur la tero de Åkersberg konstruiĝis domoj, stratoj ktp. Ĝia areo iom post iom malgrandiĝis kaj la bieno kadukiĝis.

La turnopunkto en la historio de Åkersberg estas la jaro 1918. Tiam la bieno estis vendita al lernejo de kampara mastromado, kaj oni renovigis la domojn. La lernejo baldaŭ ĝuis bonegan reputacion. Efektive estis preskaŭ devo por la filinoj de la terkulturistoj viziti la lernejon dum almenaŭ unu vintro.

En 1986 la gubernio de Malmöhus ĉesigis la funkciadon de la lernejo. Dum kelkaj jaroj la domoj estis en posedo de la komunumo Höör, kaj oni ne sciis, kion fari kun ili! En 1991 oni fine vendis la ejon al la diocezo de Lund, kiu renovigis kaj novkonstruis. Nun Åkersberg estas moderna kaj bela konferenĉejo kun malnova etoso. Ĉarma miksaĵo!

En la malnova parto nun troviĝas akceptejoj kaj kafejoj en konvena stilo. En la du malnovaj aloj troviĝas konferenĉaj salonoj kaj grupĉambroj. La SEF-kongreso disponos la tutan nordan alon.

En la novkonstruitaj domoj oni trovos manĝejon, luksan hotelon (unu- kaj dultitaj ĉambroj) kaj malpli luksan loĝejon (kvarlitaj ĉambroj).

En la bela parko el la 19-a jarcento situas la nova kaj interesa kapelo.

Höör estas facile atingebla per trajno el ĉiuj direktoj. Åkersberg estas proksima al la fervojo, kaj la stacidomo atingeblas per nur kelkminuta promeno. Al la centro de Skanio kondukas ankaŭ bonaj aŭto-vojoj.

Detalan inviton kun prezoj kaj utilaj informoj vi trovos en *La Espero* 1/1994.

Do, bonvenon en majo 1994, kiam la fagarbaroj estos hele verdaj, al bela, moderna kaj gastama Åkersberg en Höör!

Lisbet Andreasson

Redan nu kan du anmäla dig till

kongressen i Seoul
23–30 juli 1994



Kongressavgiften i svenska kronor:

Kategori	till 931231	till 940331	fr om 940401
Direktmedlem i UEA (ej MG)	930	1160	1400
Ej direkt medlem i UEA	1160	1460	1740
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1994-01-01), direktmedlem i UEA	465	585	700
Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är direkt medlem i UEA	700	875	1050

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 740101 betalar ingen kongressavgift. Avgifterna kan komma att justeras uppåt i händelse av kursändring. Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till: pg 14 74 29 – 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad som avses.

Specialarbeten om esperanto

Till studierna på gymnasienivå hör ofta ett självständigt skriftligt specialarbete i något ämne. Svenska Esperanto-Institutet samlar till sitt pedagogiska bibliotek in sådana specialarbeten som behandlar esperanto och har hittills fått in sju olika arbeten. Det senaste kom i maj 1993 och är sammanställt av **Sara Sandberg**, H3 vid Vadboskolan, Mariestad.

Titeln på hennes arbete är *Esperanto – en lösning på internationella språkproblem?* Arbetet omfattar 30 sidor och är indelat i 15 avsnitt med tydliga nothänvisningar och en väl redovisad källförteckning. Några rubriker i specialarbetet är: Artificiella språk, Olika försök att skapa ett internationellt språk, Ett nationalspråk som internationellt språk, När ska esperanto användas?

Sara Sandberg inleder och avslutar med personliga kommentarer till sitt arbete och det framgår att hon inte själv lärt sig esperanto, utan försöker hålla en objektiv distans till språket. Hon medger att det har varit svårt att finna material som inte är skrivet av esperantister.

Arbetet börjar med en intressant presentation av internationella språk, varför de behövs och vilka krav man kan ställa på sådana språk. Den delen avrundas med en slutsats som visar att "esperanto ska fungera som ett komplement till nationalspråken i internationella sammanhang".

Därefter följer en presentation av esperantos upphovsman Zamenhof, esperantos utveckling och utbredning samt en översikt över grammatiken.

Avslutningsvis anknyter Sara till esperantos nutid och framtid genom att visa på esperanto i skolan, massmedia och böcker, internationella språkproblem – inte minst med tanke på EG.

Omdömet om hela arbetet blir att det är sakligt och trevligt framfört. Det skulle mycket väl kunna tryckas upp som ett informationshäfte för dem som funderar över den internationella språkfrågan. En bra källförteckning lockar säkert många att söka vidare i det material som där anges.

Ett litet fel har dock insmugit sig bland "övriga källor": **Gabriella Sandström**, som där nämns, har också skrivit ett intressant specialarbete, men det är inte det arbete som Sara refererar till. Gabriellas arbete var en liten etymologisk undersökning, som i sin inledning också innehåller en allmän presentation av esperanto, språkets uppkomst samt krav på internationella språk. Det arbete som avses med not- och sidhänvisningar är ett omfattande arbete som **Andrea Carlbom**, H3 Fågelviksskolan i Tibro gjorde 1989.

Eftersom de tidigare specialarbetena aldrig har recenserats här, tar vi nu tillfället att omnämna dem:

Esperanto lingvo sen limoj av Annette Billhäll, Stefan Dallendörfer, Eva Hammarskjöld och Ulla Svensson. 1984. 6 sid.

Esperanto – idén och verkligheten av Andrea Carlbom. 1989. 106 sid.

Esperanto – ett specialarbete om det internationella språket av Gabriella Sandström. 1989. 18 sid.

Esperanto – fred, förståelse och förbrödning av Eva Hansson, Bettan Svelander och Kristina Svensson. 1990. 23 sid.

Esperanto över gränserna av Robert Svensson, Bo Liljeroos och Hans Letterblad. 1990. 27 sid.

En språklig analys av esperanto av Sofia Dahlgren. 1991. 10 sid.

Från Svenska Esperanto-Institutet vill vi framföra ett tack till de elever som sänt oss kopior av sitt material, och vi vill samtidigt uppmana andra som skrivit eller tänker skriva om esperanto att ta kontakt med oss under adress:

Svenska Esperanto-Institutet, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg.

Inga Johansson

**3 el 5
jam aperis!**

**ETIMOLOGIA
VORTARO DE
ESPERANTO**

Parto 3 = 120 kr

Eldona Societo Esperanto
Box 7502, 200 42 Malmö
Poŝtgiro 578-5

Korsbefruktning!

Det måste nog betraktas som något av en sensation att La Espero nu blir först i världen med att publicera översättningar till det välkända Transpiranto-språket (företrädesvis odlat i Grönköping med omnejd) vars förlagor inte härrör ur den svenska litteraturen. **Martin Weichert** har i stället valt att transpirantisera två pärlor ur esperanto-poesin: L.L. **Zamenhofs** klassiska *Ho mia kor'* (*O, mitt hjärta*) från 1880-talet och **Leif Nordenstorms** välkända och omtyckta *La Brava Bardo* (*Skaldesnillet*) från 1980-talet – en liten tribut till mer än hundra år av esperanto-litteratur.

El Bravouro Troubadouro

(*La Brava Bardo*)

par **Leif-Günthro Norrtajfún**

Baj un björck of blitzend beauté,
Un præ-historiq hüper-palma
Sinle sitzat un smart spielmann,
Un bravouro troubadouro.

Strømmet stantsas saccharozas,
Melodias muj müstiqos.

In passé composé composit.
in plusquamperfekt perfektus,
Ekspresiones eksplozivus,
Af arias architektus.

(*Ĉe betulo brile bela,
Ĉe arbego el pratempo
Sola sidis saĝa skaldo,
Tie estis brava bardo.*)

*Verŝis versojn varme dolĉajn,
Trovis tonojn tre mistikajn.*

*Pri pratagoj li poetis,
Pri estinto li aedis,
Formis frazojn fajre frapajn,
Klere kunmetadis kantojn.)*

Moj Kroppsmotor

(*Ho, mia kor'*)

par **Lollo Dzamengoff**

Moj kroppsmotor! Nix bum-bum in hectiqo,
Nunc ex moj brüst nix hüpfen au-dehors!
To keep balanĉo ist schon impractiqo.
Moj kroppsmotor!

Moj kroppsmotor! Nach period rabota
in high-noon nix por mé medalje d'or!?
Nunc basta! Un valium por nervoza,
Moj kroppsmotor!

(*Ho, mia kor'! Ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile.
Ho, mia kor'!*)

*Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu ne venkos mi en decida hor'!
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!*)

*In Transpiranto par
Martæng Vaicherto*

Pri kio temas?!?

Al niaj eksterlandaj legantoj oni eble klarigu la fonon de la supra... afero.


Jam de pli ol 90 jaroj aperadas en Svedio la satira gazeto *Grönköpings Veckoblad* (la semajngazeto de Grönköping). Raportante pri la okazajoj en fikcia provinca urbeto, ĝi prezentas ĉiam amuzan karikaturon pri aktualaĵoj kaj fenomenoj en la sveda socio. En la novaĵnoticoj kaj artikoloj (redaktitaj en karakterize bombasta stilo), la diversaj grönköpinganaj revenadas en ĉiam novaj situacioj kaj misaventuroj. Multaj el la figuroj en la daŭro de la jaroj akiris proverbecan konatecon ĉe la sveda publiko. Tio direblas ankaŭ pri

Transpiranto, kreaĵo de "elementlernejestro Ludvig Hagwald" (aŭ kiel li mem transpirantigas sian nomon – "Ludoviko Hagvaldo"). La unua apero de tiu iom ekstravaganca interlingvo sur la paĝoj de *GV* estis en 1930, kio, certe ne pro hazardo, tempe koincidis kun relative forta ondo de priesperanta intereso en Svedio... La tradukoj de konataj svedaj versaĵoj tiom amuzis la legantojn, ke en preskaŭ ĉiu numero de la gazeto daŭre aperas nova transpirantaĵo. Fakte Transpiranto estas unike sukcesa "planlingvo" en almenaŭ tiu rilato, ke tre granda procento el la svedoj scias citi iun verson en ĝi!

Gustumu novajn gazetojn en 1994!

En la ĉi-jara listo de gazetoj aboneblaj pere de SEF aperas nu novuloj, *Rok-Gazet'*, kaj *Verdire*. Ili ambaŭ eldoniĝis jam dum kelkaj jaroj, sed laŭ mia opinio ne ricevis la atenton, kiun ili meritas.

Rok-Gazet' temas ĉefe pri rokmuziko, kaj esperantlingva kaj alilingva. Sed ankaŭ "malrokmuziko" havas sian rubrikon, kie oni povas legi pri ekzemple **Kajto kaj Jomart kaj Nataŝa**. Krom intervjuoj kaj recenzoj, vi trovos artikolojn pri ekz. moderna muzik-tekniko, novelojn kaj anoncojn por kulturaj Esperanto-aranĝoj. La gazeto estas lukse presita.



Verdire publikigas artikolojn en kampo, kiu bedaŭrinde iĝas pli kaj pli aktuala: ekologio. Sed ĝi ne celas malkuraĝigi siajn legantojn, kontraŭe! Sub la rubriko "Lumbrikoj" eblas legi pri pozitivaj iniciatoj por medio kaj solidareco. Oni ankaŭ raportas pri verdecaj partioj kaj pri progreso de Esperanto ĉe ekologiistoj kaj ekologiisma konsciigo ĉe esperantistoj. Inter la artikoloj pri ĝeneralaj ekologiaj problemoj aperis en la pasinta numero artikoloj pri agrokulturo kaj pri fiŝkaptado en la lago Tanganjika.

Kiel fakaj revuoj, ambaŭ gazetoj forte laboras por pligrandigi la vortprovizojn en siaj respektivaj fakoj. Ambaŭ havas rubrikojn por diskuti kaj informi pri novaj terminoj.

La tria gazeto, pri kiu mi volas reklami, estas ne nova, sed aperas en nova vesto. Temas pri *Kontakto*, la TEJO-gazeto kiu ne

pritraktas la Esperanto-movadon. Ĝin ricevas ĉiuj membroj de UEA, kiuj havas malpli ol 30 jarojn, sed ĝi sendube estas leginda ankaŭ por pli aĝaj scivolemuloj. Antaŭ du jaroj ĝi ricevis novan redaktanton kaj pli belan aspekton, kaj ekde tiam ĉiuj legantoj laŭdas ĝiajn interesajn artikolojn. Ĉar partoj de la enhavo estas verkita en facila lingvaĵo, ĝi aparte taŭgas por post-komencantoj aŭ por instruado.

En ĉiu numero aperas ekz. nov-verkita kaj amuza novelo de Claude Piron en tre facila lingvo. Alia kialo aboni *Kontakton* estas, ke ĝia ekzisto estas minacata se ĝi ne trovos pliajn legantojn, kaj ĝia malapero estus granda perdo por la junularo.

Do, ne hezitu uzi la bonegan abonservon de SEF por sperti novan legadon en 1994!

Kajsa Larsson

Dags att prenumerera

Att läsa tidningar på esperanto är givande ur många synpunkter. Man tränar sitt språk och man får nyheter från hela världen. På årets lista finns några nyheter. Priserna är beräknade per den 1 november; p.g.a. den ovissa valutamarknaden kan de komma att ändras.

El Popola Ĉinio , Kina	12 nr/år	210 kr
Esperanta Finnlando , Finland	6 nr/år	60 kr
Eventoj , Ungern (flygpost 330 kr)	24 nr/år	285 kr
Fonto , Brasilien	12 nr/år	175 kr
Heroldo , Italien (flygpost 200 kr)	16 nr/år	170 kr
ICEM , Frankrike	4 nr/år	125 kr
Juna Amiko , Ungern	4 nr/år	70 kr
Kontakto , Nederländerna	6 nr/år	160 kr
Kulturaj Kajeroj , Frankrike	4 nr/år	115 kr
La Espero el Koreio , Sydkorea	6 nr/år	135 kr
La Jaro , Belgien	årskalender	45 kr
La Kancerkliniko , Frankrike	5 nr/år	185 kr
La Letero de l' Akademio , Frankrike	4 nr/år	170 kr
La Ondo , Ryssland	6 nr/år	85 kr
Literatura Foiro , Schweiz	6 nr/år	235 kr
Litova Stelo , Litauen	? nr/år	95 kr
Monato , Belgien (flygpost 340 kr)	12 nr/år	290 kr
Norda Prismo , Finland	4 nr/år	110 kr
Norvega Esperantisto , Norge	6 nr/år	80 kr
Paco , Belgien		105 kr
Rok-Gazet' , Frankrike	4 nr/år	160 kr
Ruslanda Esperantisto , Ryssland	12 nr/år	70 kr
Scienca Revuo , Schweiz	2 nr/år	175 kr
VERD-ire , Norge	4 nr/år	95 kr

Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på **pg 14 74 29-5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby**. Ange vilka tidningar som avses. Förfrågningar angående tidningsprenumerationer kan göras hos: **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.**

Per vortoj vestitaj pensoj

Aira Kankkunen: **interrilatoj**. *Propra eldono, Gotenburgo 1993. 85 p. 50 SEK.*

Oranĝkolora kovrilo kun komputilaj literoj kaj figuro. Facile legeblajn kaj facile kompreneblajn esprimojn la aŭtoro utiligis. La poemaro *interrilatoj* de Aira Kankkunen havas kvin partojn, kun interrilatoj inter si.

La aŭtoro Aira komencas per ĉarma kaj milda sento de frua printempo. Tie ŝi spegulas ne nur siajn sentojn, sed ankaŭ pensojn kaj signifojn de la vivo. Iom post iom ŝi metafore tiras naturajn fenomenojn al homaj rilatoj.

Ŝi ankaŭ akuzas pro la granda detruado de paco, amikeco kaj interhoma digno dum la Gollmilito januare 1991. La diablo, satano, Sadam en sia lando ankoraŭ aktivas por malhelpi pacon, por kontentigi propran avidecon.

La voĉo de la aŭtoro ne estas forta, tamen sufiĉe akra kaj objektiva. Ŝi mem malvarmigas sian voĉon kaj metas distancon inter poemo kaj si mem per bildeca priskribado.

Vere ŝi havas amikojn / dume panpecoj troviĝas en ŝia sako.

Jes, homoj kaj birdoj aŭ bestoj tute same agas, kaj la negativa senco de tiu esprimo estas por mi pli forta ol la pozitiva, eble kontraŭ ŝia intenco.

La aŭtoro ne forgesas kritiki nian ĉiutagan vivon, en kiu daŭre perdiĝas homeco kaj humaneco. Ŝi ankaŭ montras pesimismon kaj malesperon de homoj.

Kial homoj fariĝas malfortaj kaj time-maj antaŭ la estonteco? Kian signifon havas nia pasinteco? Ĉu la pasinteco bremisas la antaŭeniron de via estonteco? De kie venas sopiro? Kian rolon ludas atendo en via vivo? Ĉu vi kuraĝas forpreni vian sojlmaton por akcepti ĉiajn vagabondojn? Kian rolon ludas viaj sonĝoj? Ĉu vi havas kaŝitajn sekretojn kun ekstra pezo?

Multajn demandojn la legantoj mem povas trovi kaj pripensi.

Homoj estas ĉirkaŭvolvitaj per profesio / posteno / kaj morala rolo.

Sed kiel la silkraŭpo kun sia kokono, homoj devas iam kaj iel forlasi sian ĉirkaŭvolvaĵon. Eble pere de okuloj oni mal-

kaŝas ĉion, forprenas kovraĵon. Sed tiaj okulludoj estas profundaj kaj misteraj, pro tio oni ofte ne povas atingi sian celon, kaj volonte transirus al la vortoj, pri kiuj la aŭtoro jam diris:

Kie / kie estas sentoj / per vortoj vestitaj pensoj?

Okuloj – kredeble ili estas la plej fidindaj aŭ honestaj partoj de ni.

La lasta parto de tiu ĉi poemaro temas pri amo. Aira esprimas amaspektojn en historio, malpermeso, psikologio, socio kaj senlimo. Amo ĉiam havas la plej ampleksan kaj senĉesan enhavon en la vivo.

Unu bedaŭrinda afero estas, ke en tiu ĉi poemkolekto troviĝas pluraj eraraj kaj miskomprenigaj literumadoj.

La facilaj esprimoj de Aira donas kaj vekas al la legantoj pli variajn ideojn kaj sentojn pri preskaŭ ĉio. La komplikaj kaj malfacilaj esprimoj de multaj poetoj ne ĉiam havas tiel altajn kvalitojn, kiel oni kredas. Multaj tiaj poemoj riskas resti miskomprenitaj en maniero, pri kiu eĉ la aŭtoro mem ne konscias. Kapablo de simpla esprimo ofte montras altan lertecon ĉe aŭtoroj.

Mallonge dirite, en tiu ĉi libro la legantoj povas renkonti akran kaj detalan observadon, amoplenan rigardon kaj lamenton pri malbenindaj okazaĵoj en la mondo, kiujn la aŭtoro simple, facile kaj lerte esprimis.

Boo Mee Kim-Lindblom

Klasikaĵo reaperas

Vladimir Varankin: **Metropoliteno**. *Sezonoj, Jekaterinburg 1992. 264 p.*

Metropoliteno, unuafoje aperinta en 1933, estas unika romano, klasikaĵo kaj historia mejloŝtono en la originala esperanta literaturo. Hodiaŭ, post sesdek jaroj, ĝi reaperas surprize freŝa, malgraŭ sia aparta stilo (kun multaj lingvaj strangaĵoj kaj slavismoj) kaj malgraŭ temo, kiu unuavide povus ŝajni neaktuala.


Kiel priskribi la intrigon? Se mi dirus, ke en ĝi rolas amo kaj ĵaluzo, Moskvo kaj Berlino de la 1920-aj jaroj, komunistoj kaj nazioj, laboristoj kaj burokratoj, kaj krome konstruado de subtera fervojo, eble neniu riskus eklegi la romanon? Faru tion malgraŭe! Kaj iomete persistu; post deko da paĝoj vi jam al kutimiĝos al la apartaj stilo kaj medio, kaj trovos rakonton vere vivan kaj originalan!

En tiu ĉi eldono oni (tamen ne konsekvence) reviziis la lingvon de Varankin laŭ principoj specifitaj en detala komentario.

La eldono de Sezonoj estas teknike bona kaj enhavas ankaŭ interesan biografieton pri la aŭtoro, mortpafita de KGB en 1938.

Sten Johansson

Aŭskultu vian libron!



Pli ol du kaj duona horoj da amuzaj kaj pripensindaj rakontoj, legataj de la aŭtoro mem kaj Ingrid Maier.

120 kr

(inkl. varimposto kaj sendkosto)

Eldona Societo Esperanto
Box 7502, 200 42 Malmö · Poŝtĝiro 578-5

Eta risiko...

Ankaŭ ĉi-foje ni ĝojis pro pluraj serioze prilaboritaj tradukproponoj, kvankam la nombro de respondintoj estis malpli granda ol al la unua tradukdefio. Espereble neniu hezitos partopreni estonte – oni ja riskas nenion, krom eventuale ion novan lerni!

Unu el la ĉi-fojaj tradukintoj, **Sten Johansson**, inspirite de niaj komentoj pri "falsaj amikoj" en la antaŭa numero, ankaŭ kaptis la okazon atentigi pri du tiaj – tamen ne trovitaj sub la la jena rubriko, sed en la cetera gazeto...

Li skribas pri la titolo "SEF-kongreso en trista vetero": "Ĉe abstrakta substantivo tio eble ne ĝenas, sed ĉe homo estus bone sciĝi, ĉu li/ŝi estas malĝoja, malgaja (= trista, laŭ mia juĝo pri normala lingvouzo) aŭ malinteresa, teda (svede 'trist'). Alia falsa amiketo en la sama numero estis *pulmerkato*, kiu devus esti *pulbazar*."

Koncerne la misan vorton "pulmerkato", la redaktoro (Per Aarne) honte konfesas sian eraron kaj pardonpetas – preferindus konsulti sian vortaron unu fojon tro, ol unu fojon maltro!

Pri "trista vetero" la afero eble ne estas same evidenta, kvankam oni ja havas kaŭzon suspekti influon de la sveda. La titolon tamen proponis la verkinto de la artikolo mem, kaj en dubaj kazoj oni verŝajne prefere supozu, ke homoj fakte scias, ĝuste kion ili volas esprimi. Finfine, se lumo povas esti ĝoja kaj pejzaĝo gaja (ambaŭ laŭ PIV), kial ankaŭ vetero ne povus esti – trista?

Kiel ajn, sekvu la imitindan ekzemplon de Sten Johansson! Tiuspecaj komentoj kaj atentigoj pri la lingvaĵo de tiu ĉi rubriko aŭ de *La Espero* kiel tuto estas ĉiam tre bonvenaj kaj granda helpo al pliboniĝo. Oni klopodu ĉiam lerni de faritaj eraroj – ĉu siaj propraj aŭ tiuj de la redaktoro!

Sed nun al la ĉi-foja tradukdefio. Traduku la jenan tekston al bona Esperanto kaj sendu ĝin al **Per Aarne Fritzon** (adreso sur p. 2) antaŭ la **20-a de januaro**:

"'Fryshuset' är inom Posten det allmänna namnet på ledningens 'projekt för utveckling av oplacerad personal inom Brev'. Hit har postledningen fört över människorna som blev över då den förändringsprocess som Posten nu genomgår nådde även huvudkontoret. Syftet är att stödja oplacerade att få nya arbeten, inom eller utom Posten. Projektbeskrivningen är välvilligt formulerad, men de direkt berörda upplever endast utfrysning och isolering. Trotjänare som arbetat 20, 30 och t.o.m. 40 år inom Posten är sedan i somras helt utan arbetsuppgifter. De sitter i kala moduler utan namnskylt på dörren och omgivna av flyttlådor de inte finner någon mening att packa upp. Deras situation är känslig och de flesta föredrar att vara anonyma.

– Förändringar får man acceptera, men inte psykisk misshandel.

Det är de första ord vi möter då vi besöker de åsidosattas lokaler. Personer som vigt hela sitt arbetsliv åt Posten uttalar sin starka oro inför framtiden, oavsett om det blir bolagisering eller inte. Oron gäller arbetsmiljön och personalpolitiken."

(El *Dagens Nyheter* 10/12 1993)

Ĝis, kaj bonan sukceson!

Per Aarne Fritzon
Bertilo Wennergren

Sube sekvas propono de traduko de la teksto en La Espero 5/93. (Ĝi estas kompilita el esprimoj el la alsenditaj tradukaĵoj, krom en tiuj kazoj, kiam ni havas fortan motivaĵon rekomendi alian vortumon.) Oblikva streko (/) apartigas du aŭ pliajn alternativajn tradukojn de esprimo aŭ frazo. Rondaj krampoj, kiel en "lernejestr(in)o", indikas eblan sed ne devigan aldonon. La ciferoj referencas al la subaj komentoj. (Se vi malkonsentas pri io, ni bonvenigas viajn reagojn!)

La stokholma borso starigas novajn rekordojn. Merkrede ĝia akcia indico atingis novan pinton je la dua fojo/duafoje en du (sinsekvaj) tagoj. Samtempe la svedaj konjunkturaj prognostoj antaŭdiras pluajn malfacilaĵojn por la landa ekonomio. Tio ŝajnas¹ nekomprenebla, kaj efektive estas. Tiu, kiu provas uzi ordinaran racion² por analizi tion, kio okazas en la borso, ofte fiaskas/malsukcesas. La stokholma borso nome estas ĝuste borso, merkato, kie proponadon kaj postuladon/ofertadon kaj mendadon decidis atendoj kaj spekulacioj, revuloj kaj malsaĝuloj, hazarduloj kaj ŝparuloj, fridaj/senemociaj analizistoj kaj aŭdacaj/sentimaj riskantoj³.

La borso/la borsa stato do estas mezuro de homaj atendoj, ne nur koncerne la profitojn⁴ de la entreprenoj, sed ankaŭ ekz. pri la evoluo⁴ de la rentumo⁵. Tiu, kiu havas monon por investi/ŝparloki⁶, serĉas plej bonan profiton je kiel eble plej malgranda risiko. Se li pensas, ke la rentumo malaltiĝos, ne estas (al li) tre interese investi en havaĵoj, kiuj donas rentuman profiton. Tiam la kapitalo serĉas al si vojon al la borso. Kaj kiam la mono direktas sin al la borso, la postulado kreskas kaj la kurzoj altiĝas.

1. Pluraj tradukis "verkar" per "aspektas", kio tamen estas nepra eraro. "Aspekti" nome uzblas nur pri io, kio konkrete impresas la vidsentumon.

2. Laŭ ni, la vorto "racio" pli taŭgas ol "prudento", kiun iuj tradukintoj proponis, ĉar ĉi tie temas pri apliko de logika pensado por kompreni okazaĵojn, dum "prudento" pli esprimas ĝeneralan saĝecon kaj sanan pensadon.

3. Unu tradukinto evidente sentis grandan angoron je la penso, ke ni eble venos al la ideo rekomendi formojn similajn al "fride analizantoj" kaj "sentime riskantoj"! Li povas trankviliĝi – tiaj monstraĵoj estas laŭ nia opinio nenio alia ol la bedaŭrinda rezulto de mensa ŝippereo...


4. Ni preferis fari unu frazon el la du originalaj, ĉar la malelegante rompita penso de la sveda teksto facile konfuzas la leganton (kaj trompis ankaŭ kelkajn tradukintojn); mezurataj per la borso nome daŭre restas la *atendoj* pri profitoj kaj rentuma evoluo, ne tiuj lastaj mem.

5. Iu tradukis "...utan också t.ex. på hur räntorna skall bli" per "sed ankaŭ pri ekzemple tio, kiomaj estos la interezoj". Tia uzo de "kioma" estas erara – oni atentu, ke "kioma" nur povas havi la vicordan signifon "vilken i ordningen". Tiu ĉi eraro iel similas al alia, kiun oni suliĉe ofte vidas, nome la uzo de "nura" kun intencita senco de "sola" aŭ "ununura" (kiel en "la nura kritikinda afero estas..."). "Nura" ne uzblas tiel, ĉar ĝi jam estas uzata kun la senco "nenio alia ol" (kiel en "lia parolo konsistas el nura galimatio").

6. Ni konsekvence preferis pli kutimajn, komunuzajn vortojn ("investi", "havaĵo") al pli teknikaj aŭ nekutimaj ("plasi", "aktivoj"). Finfine la teksto sin turnas al laikoj en financo – kiaj certe estas la redaktantoj de tiu ĉi rubriko, viaj fidelaj

PAF & BW

Krucvortenigmo



Horizontale:

- | | |
|---|---|
| 1. <i>Malgranda patrujamanto</i> | 6. <i>Skandinav' – Veturildiska</i> |
| 2. <i>Estantan soldaton</i> | 7. <i>Fraki' – Meso</i> |
| 3. <i>Rabobeston – Grando</i> | 8. <i>Posedadmontra vorto – Grup' da laboristoj</i> |
| 4. <i>Maltrankvila – Ĉefurb'</i> | 9. <i>Baza koloro en pentraĵo – Farite</i> |
| 5. <i>Proceduroj en linafarado – 17-a litero – Natrio</i> | 10. <i>Positivian elektrodon – Plendokrio</i> |

Vertikale:

- A. *Kastrita kokino – Post mi*
 B. *Malplezuranton*
 C. *Furaĝujon – Femalo*
 Ĉ. *Organoj – Prepozicio*
 D. *En maligna vundo (rad.) – Danĝero*
 E. *Beligas – En urno*
 F. *Komenco de tubo – Havenurbe*
 G. *Anestezil' – Aktej'*
 Ĝ. *Ceremonian veston – Vinberuje*
 H. *Vorto kiu imitas naturan sonon*

Kompilis: Lennart Persson

Solvo de la krucvortenigmo en La Espero n-ro 5/1993

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	T	A	B	L	O	T	E	N	I	S
2	E	R	A	A	N	■	M	O	N	O
3	L	A	N	D	O	L	I	M	O	J
4	E	K	■	P	■	A	L	O	J	O
5	S	A	V	A	N	T	O	J	■	■
6	K	N	A	R	■	E	■	■	O	E
7	O	■	S	T	A	N	D	A	R	D
8	P	A	T	E	N	T	O	R	D	E
9	■	M	A	T	■	A	R	B	E	N
10	M	A	J	O	R	■	S	A	N	O

Kvinpinto – SEJU:s tidning

Efter ett uppehåll under 1992 har utgivningen av *Kvinpinto* börjat fungera igen. Hittills har fyra nummer utkommit under 1993 med Per Aarne Fritzon som samordnande redaktör. Eftersom *Kvinpinto* är gemensamt organ för de nordiska ungdomsförbunden så har varje land även sin egen redaktör som ska förse tidningen med material. Innehållet består huvudsakligen av rapporter från olika

arrangemang samt information om vad som komma skall. Men även reseberättelser, recensioner, tävlingar och roliga historier finns med.

I september 1993 träffades representanter för de nordiska ungdomsförbunden i Norge för att diskutera sina gemensamma angelägenheter, framför allt *Kvinpinto*. Eftersom ungdomsförbunden i alla de inblandade länderna är tämligen små, så har den gemensamma tidningen stor betydelse. Troligen skulle inget av förbunden själva orka hålla sina medlemmar så pass välinformerade som man nu kan. Men självklart kan det alltid bli bättre. Vid mötet beslöts att vi

ska söka samarbete med de baltiska ländernas ungdomsförbund, för att på så sätt eventuellt kunna utöka basen ytterligare. Nästa års nordiska ungdomsträff kommer f.ö. att äga rum i Finland.

Alla SEF-medlemmar under 30 år får *Kvinpinto*, men har du överskridit denna gräns och ändå känner dig ung, alternativt vill stödja ungdomsrörelsen, så finns det möjlighet att prenumerera. Sätt in 50 kr på SEJU:s pg 51 33 01-2. Vill du även ha de europeiska ungdomsförbundens gemensamma informationsblad *Koncize* så kan du lägga till 70 kr.

Kajsa Larsson

Sten Svenonius
Vendelsfridsg 4C
21764 Malmö


Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Ny adress: Vikingagatan 24



Flyttning av Esperanto-Centro till den nya adressen Vikingagatan 24 har pågått under november och hela december.

Den nya lokalen är lika lätt att nå som den vi haft sedan 1980 på




Brunnsgatan. Närmaste tunnelbana är St Eriksplan som ligger tre hållplatser från Hötorget i innerstadens avgiftszon. Gångavståndet är liksom förut bara några minuter. Karlbergs pendeltågsstation, där alla pendeltågslinjer stannar, ligger på lika kort gångavstånd. Dessutom finns flera busslinjer.

Bakgrunden till flyttningen är de allt högre kostnaderna på Brunnsgatan. I mitten och slutet av 80-talet, när alla lokalkostnader steg häftigt, chockhöjdes hyran

även för Esperantoförbundet. Hyresavtalet löper på tre år, vilket är det normala för lokaler, och efter att ha förhandlat fram en mjukare övergång till det högre hyresläget, började styrelsen så smått leta efter en billigare lokal.

Samtidigt började verksamheten på Esperanto-Centro att förändras, medlemmar rustade upp lokalen på Brunnsgatan, och när vi i somras äntligen hittade en annan lokal med bra läge och acceptabel hyresnivå, så skar det i hjärtat att behöva börja om igen.

Den nya lokalen är mindre, och det betyder att dels har Kaisa och Ole Hansen räknat på milimetrarna för att planera hyllor, arbetsbord, mötesplats, bibliotek. Dels har flera medlemmar rensat



eller håller på att rensa i de stora mängder arkiv som samlats under många år, och i tidskriftssamlingen.

I det nya Esperanto-Centro på Vikingagatan kommer det att finnas plats för föreningsmöten, styrelsemöten, studiecirklar, expedition, bokservice, informationsmaterial, bibliotek, utskick av medlemstidningen och av böcker och material till hela landet och till utlandet. Öppettiderna blir begränsade liksom förut, men det verkliga öppethållandet kommer att vara mycket mer, och telefonen kopplas så att den som ringer kan få svar på olika tider.

Ulla Luin

På bilderna syns Kaisa Hansen utanför och inuti nya Esperanto-Centro på Vikingagatan i centrala Stockholm. Det ser lite rörigt ut, eftersom flyttningen pågår för fullt.